FN PER ANC 47

ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO
.unuiĝo de la normandaj esperantistoj
n° 158 TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE.

SOMERO 1987A - ( N° 73A NOVA SERIO )

# HOULGATE 3-4 OKT. 1987
# NORMANDA KONGRESO

Ni festos la Centjariĝon de Esperanto la 3an kaj 4an de Oktobro 87 en HOULGATE, Calvados. La ranoj en tiu-ĉi bulteno en-tenataj (bedaŭrinde?) ne partoprenos la Ĝeneralan Kunvenon de nia Normanda Asocio, sed anuncis dolĉan veteron dum la tuta semajnfino. Pli ol ĉiuj aliaj vi scias kiel vizitinda estas nia bela regiono kiam sunas, aparte tiu Pays d'Auge kies urbetojn BEUVRON EN AUGE, PONT L'EVEQUE, HONFLEUR, ni ekskurse vizitos.

Pluvo aŭ suno ekstere fakte ne gravos : ĉiukaze regnos suna kaj entuziasma etoso inter ni por festi la naskiĝon de la dua jarcento de la Internacia Lingvo. Kelkaj rakontos sian partoprenon al la Kongreso de UEA aŭ TEJO en Pollando, al tiu de SAT en Bulojno, kaj al aliaj ĉi-tie ne mencieblaj ĉar tro multaj.

Ĉie en la Mondo la taskoj ne mankas por ke Esperanto estu la lingvo de Homaro pli fratema, pli solidarema. Ankaŭ en niaj kvin departementoj ni varbu novajn esperantistojn, konvinku instancojn aŭ politikistojn, ĉiu inter ni posedu mil brakojn kaj nelacigeblan kapon ! Ĉiuj proponoj kaj novaj fortoj estos bonvenaj en niaj grupoj.

# NİA VİVO EN :

## LE HAVRE

La grupa komitato prilaboras organizon de jubilea manifestacio, la 5an de Septembro, ĉe strato Zamenhof. Pri venonta ekspozicio en la parko de Rouelles, dato devas esti decidota kune kun urba respondeculo. Ni antaùvidas viziton de Berlina paro dum Septembro ; tiuj gesamideanoj eble jam kontaktis aliajn normandajn grupojn.

La 14 an de Junio, kelkaj Havranoj ĉeestis la bapto-feston de ĉevalidino el Marais Vernier... kial ?...
... ĉar ĝi havas esperantan nomon !!!..."Naturamikino"...



Antaù unu monato, ok membroj de nia asocio vojaĝis al Britio. Amikan transmanikan semajnfinon organizis Southampton Esperanto Group. De post 15 jaroj, regulaj interŝanĝoj firmigas amikan reton inter niaj ambaùaj urboj. Dum dimanĉo, niaj gastigantoj vizitigis la familian nobeldomon de Lord Mounbatten "Broadlands".

Havranoj ĉeestos Internacian Kongreson en Varsovio. Antaù Houlgate, ili esperas renkonti vin, tie en Esperantujo !

Sylvie Caron

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%

## YVETOT


Dum Februaro okazis en la junuldomo granda ekspozicio pri Esperanto, kiu daùris unu semajnon. Post tiu ekspozicio komenciĝis kurso, kun bedaùrinde nur unu lernantino. Tiu kurso, farita de S-ro Duhamel, daùris nur kelkajn semajnojn pro malsano de la lernantino, kiu poste ne plu povis daùrigi la lernadon pro familiaj kialoj.

La 13 an de Februaro, S-ro Duhamel raportis al la grupo pri sia pasintjara vojaĝo al Ĉinio okaze de la Universala Kongreso en Pekino. Li vojaĝis trajne tra Sovetunio kaj Mongolio kaj povis montri al ni interesajn dokumentojn pri vere bela vojaĝo. Iom poste, li ankaù parolis pri tio kaj pri Esperanto ĉe la loka radiostacio "Radio Solaris".



NI ANKORAÙ ŜAFE
RAPORTAS SUR LA SEKVONTA PAĜO !!







La 26an de Aprilo, je la 11a horo, ni akceptis en Yvetot la partoprenantojn de la Internacia Rondbiciklado tra Eŭropo por Esperanto. Ili klarigis al ni la celon de tiu biciklado, kaj al la ĉeestantoj (el kiuj unu ĵurnalisto) ili parolis pri Esperanto. Poste, ili iris vidi nian Straton Zamenhof, kaj tagmanĝis en nia urbo antaŭ ol foriri al Rouen. Du artikoloj aperis poste en "Paris-Normandie" kaj "Le Courrier Cauchois".

Niaj kursoj rekomenciĝos en la Junuldomo (se ni havas lernantojn) la 21an de Septembro. Intertempe, eble 2 Germanoj faros en Yvetot prelegon en Esperanto pri ekologio.

Fine, nia grupo intencas festi la centjariĝon de Esperanto per komuna tagmanĝo la 11an de Oktobro.
Ĉiuj aliurbaj partoprenantoj estos bonvenaj.




Pierre Pottier

%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%%

## CALVADOS

" La Gazette de la Manche"aperigis foton kaj artikoleton pri la vizito de Jorgos en Avranches.(50). Nia internacia biciklanto videbla estas en "Ouest-France" kaj "Le Bocage Libre", akceptita de S-anoj LEBRET kaj HAULARD kiam li atingis Vire(n), la urbo kie loĝas tiuj-ĉi fervoraj esperantistoj.

La saman tagon lin atendis ĉe la urbodomo de Caen S-anoj TAILPIED, ETIENNE, NICOLAS kaj nekonata subtenanto okdekjara. La Sekretario pri Sporto kaj Juneco bonvolis subskribi la taglibron, jam suskribis multaj en aliaj urboj. Pro la kilometroj kaj la neimageble pezaj pakaĵoj, entenantaj pli da dokumentoj pri Esperanto ol vestoj, la biciklo aspektis laca ; ĝi mallaŭte konfesis al mi : "Ĉiuj frenezaj, tiuj Esperantistoj !"...

Tri studentinoj de la Universitato de Caen prezentis al sia profesoro de lingvistiko (dua jaro) kelkajn aspektojn de la esperanta gramatiko.

Por ĝin prepari ili plurfoje renkontis Gilbert Angenault kaj Yves Nicolas. Tiuj renkontoj estis tre interesaj dank'al la faritaj demandoj sed ankaŭ pro tio ke pordeto de la Universitato ekmalfermiĝis, kvankam malpli ol antaŭvidita ĉar la studentinoj invitis nin ĉeesti la publikan prelegon okazontan...bedaŭrinde tiu-ĉi ne okazis pro manko da tempo. Ni la lingvistikan bibliotekon regule informos por ke tiu unua paŝo ne estu rapide forgesita.

De la 22a ĝis la 26a de Junio, "Radio France Normandie Caen" dum kvin minutoj ĉiutage prezentis Esperanton. La diversajn aspektojn - historio, literaturo, movado,...- pritraktis la triopo Tailpied, Angenault, Nicolas.
Pli profunda informado estus dezirinda, sed ankaŭ tie malfermiĝas pordo dank'al regula sendado de dokumentoj de UFE kaj SAT-Amikaro.


S-ano MARTIN dum tridek minutoj prezentis Esperanton kadre de elsendo de "Radio Espérance, Notre Dame des Ondes", en Lisieux.




LA ALIĜILO NEPRE SENDOTA ANTAŬ LA 5a DE SEPTEMBRO

AL S-ano ANGENAULT

# EKSKURSO




Ĉar la ekskurso komenciĝos sufiĉe frue post la tagmezo, kelkaj inter ni eble ne povos ĝin partopreni per la de nia Asocio luita aŭtobuso. Sed al fervoraj esperantistoj kio povus esti ne atingebla, ĉu ne ! Jen ĉi-sube kelkaj rendevuoj kie la kompatindaj unuopoj facile trovos la grupon.

14.00 - 15.00

Ni vizitos BEUVRON en AUGE



15.45 - 16.30

PONT L'EVEQUE

Nia verda stelo povus iĝi ruĝa kaj la tieaj loĝantoj povus aŭdi niajn ĝojajn kantojn kiam ni vizitos la memorindajn "Chais du Père Magloire"

16.45 - 18.00

HONFLEUR

Ni forlasos la aŭtobuson ne malproksime de la Fiŝtraktejo (la Criée) por viziti la "Vieux Bassin" kaj la preĝejon "Sankta Katerina".

HOULGATE 3A KAJ 4A DE OKTOBRO 1987A - VILLA SIMONE - U.N.E.
(1 AVENUE DE LA GARE - 14510 HOULGATE)

**PROGRAMO :**

SABATON LA 3AN DE OKTOBRO :

| | |
|---|---|
| - AKCEPTO EN LA CENTRO "VILLA SIMONE" : | 10.00 - 12.00. |
| - KOMUNA TAGMANĜO : | 12.3o. |
| - EKSKURSO : | 14.00 - 19.00. |
| - KOMUNA VESPERMANĜO : | 19.3o. |
| - DISTRA VESPERO : | 20.30 - 23.00. |

DIMANĈON LA 4AN DE OKTOBRO :

| | |
|---|---|
| - MATENMANĜO : | 8.00 - 9.00. |
| - ĜENERALA KUNVENO : | 9.3o. |
| - KOMUNA TAGMANĜO : | 12.00 - 14.00. |
| - PROMENADO EN HOULGATE : | 14.00 - 16.00. |
| - ADIAŬA GLASO KAJ DISIĜO : | 16.00. |

---

SENDOTA ANTAŬ LA 5A DE SEPTEMBRO AL SRO ANGENAULT, 23 ROUTE D'ASNELLES F.14114 VER SUR MER. TELEFONO : 31.22.22.86.

NOMO :................................ ANTAŬNOMO :.................

ADRESO :..................................................

AKOMPANATA DE :...........................................

MI ALVENOS EN VILLA SIMONE LA.....AN DE OKTOBRO JE LA.....HORO.

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| ADHESION, ALIĜO : | | | ___x 30,00 = | ________. - |
| DEJEUNER DU SAMEDI | OUI | NON | ___x 37,50 = | ________,______. |
| EXCURSION : | OUI | NON | ___x 50,00 = | ________. - |
| DINER ET SOIREE : | OUI | NON | ___x 37,50 = | ________,______. |
| NUIT ET PETIT DEJEUNER : | OUI | NON | ___x 61,50 = | ________,______. |
| DEJEUNER DU DIMAN-CHE. : | OUI | NON | ___x 57,50 = | ________,______. |
| | | | TOTAL : | ________,______. |

Prix spécial pour les enfants (réduction 13,00 F. par jour).
Ci-joint un acompte de 100,00 F. par personne pour la réservation à l'ordre de Mr. ANGENAULT Gilbert. Cette somme est remboursable en cas de désistement avant le 20 septembre 1987.

DATE : SIGNATURE :

# 6

## *TRE MODERNA FABELO*



Tiun ĉi eksterordinaran kaj freŝdatan fabelon mi nur peras transigante la respondecon al mia tre fidinda amiko – ni nomu lin Sen Dubo – kiu la unuan fojon rakontis ĝin ĉe blanka tablo, kie ne mankis glasoj.

"Aŭdu nur" – diris Sen. "Mia amiko, Ripsrops, veturis antaŭ nelonge per sia beleta ĉaro, vi scias, tiu Mercedes, inter Arĥangelsk kaj Kopenhago sur la ŝoseo. Sed li jam ne estis malproksime de Kopenhago, kiam ĉe benzinputo, post kiam li aĉetis hejtmaterialon kaj dum la agado de la benzinulo, li iom promenis. Subite li aŭdis voĉon sub si:

"Sinjoro Ripsrops, sinjoro, bonvolu atendi..."

Ripsrops rigardis malsupren kaj vidis ranon ruliĝantan al li. Li ne estas speciala ŝatanto de ranoj, sed io kaptis lin en la afero.

"Ĉu *mi* komprenas rane? Kaj ĉu vi povas paroli? Ĉu vi konas min?"

La rano respondis:

"Jes, kara sinjoro Ripsrops, mi povas paroli, sed mi ne parolas rane, sed dane. Mi petas vin, sinjoro Ripsrops... Mi frostas. Metu min en vian poŝon. Ĉu mi rajtas kunveturi al Kopenhago? Por bonfaro vi ricevos bonon!"



Ripsrops tre miris, precipe, ke la rano frostas, kiam estas varme, sed rano estas rano, kaj ĉar la petita varmo ne kostos al li elspezojn, li metis la ranon en sian poŝon. (... Kion vi diras? Jes... Jes, li estis sobra kiel mi.)


Iom post iom la rano iĝis hejmeca ĉe Ripsrops. Ĝi petis eĉ manĝon kaj iom da akvo, kiujn Ripsrops, kiu konsideris la ranon cetere tre modesta, donis al sia kunvojaĝanto. Tiel ili alvenis vespere al la metropolo, eĉ al la loĝejo de Ripsrops, ĉar la rano petis ripozlokon. Ripsrops malfermis la pordon de sia loĝejo kaj tiam la rano denove ekparolis:

"Kara sinjoro Ripsrops, mi estas tiel dormema. Ĉu mi rajtus dormi en tiu lito?"

Ripsrops ekmeditis. Estis la unua fojo, ke iu fremdulo volis dormi en ilia familia lito, sed efektive sinjorino Ripsrops estis for kaj tiu ĉi mirinda rano estis tiel dormema. Li metis la ranon en la apudan liton kaj demetis sian jakon kaj komencis pretigi sin por la nokta trankvilo. Li volis jam mallumigi, kiam li alrigardis la apudan liton kaj tiam li rimarkis, ke el la stranga rano fariĝis belega reĝidino, kiu supozeble apenaŭ estis provizita per noktovestoj. Lia rigardo ekglitis sur la marmoraj ŝultroj de la reĝidino. Ripsrops tute teruriĝis. Li frotis la okulojn. La reĝidino alrigardis lin kaj diris:



"Ri-i-ipsĉjo!"




Sen Dubo, t.e. la rakontanto, nun faris longan paŭzon kaj sekvis iom malcerte la ŝvebon de la cigareda fumo.

Mi urĝis:
"Nu, kiel estis poste?"
Sen alrigardis min kaj diris:
"Ĉu vi vere kredas tiun ĉi historion?"
"Kredi? Tute ne. Kial mi kredu?"

"Nu ankaŭ sinjorino Ripsrops, kiu tiumomente realvenis neatendite el sia feriado en Polinezio kaj malfermis la pordon de la dormoĉambro, ne kredis ĝin. Eĉ ne unu vorton..."

*F. Szilágyi*
*(el "Norda Prismo")*



&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&


REDAKTAS : Yves NICOLAS, 17-37 Quartier du Bois
14 200 HEROUVILLE Tel. 31-95-11-81

Eldonita, ekspedita de :
UNION des ESPERANTISTES DE NORMANDIE
C. C. P. n° 283 40 H ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma kotizo : **40** F.
Subtena ek de : **50** F.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno : **40** F.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"


&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

# U.F.E. KONGRESIS:

Niaj Geamikoj DENISE kaj ANDRE LOISEL el St RAPHAËL, kiuj organizis la lastan kongreson de UNUIĜO FRANCA por ESPERANTO en tiu urbo sendis al ni la jenan komunikon :

" De la 5a ĝis la 9a de junio, la 79a Franca kongreso "
" okazis ĉe la lazurmarbordo, apud Fréjus kaj Saint "
" RAPHAëL. "
" Partoprenis en la kongreso 132 francaj samideanoj "
" kaj 27 eksterlandanoj el 10 landoj. "
" Dum la kongreso la bela mediteranea vetero akompa-"
"-nis la partoprenantojn okaze de la ekskursoj, same "
" kiel dum la paŭzoj inter la kunvenoj. "
" La alta Protektanto de la kongreso estis Sro LEO- "
" -TARD, ministro de la Kulturo kaj komunikado kaj en "
" la Honorkomitato estis kvin Deputitoj, unu Senatoro "
" kaj aliaj eminentuloj. "
" Laŭ la ricevitaj informoj tiu Jubilea Kongreso "
" estis sukcesa. "

Gratulojn al niaj geamikoj LOISEL pro tiu sukceso !

---

LA 11AN DE MAJO 1947 FONDIĜIS " UNUIĜO DE LA NORMANDAJ ESPERANTISTOJ. TIU ASOCIO CELAS GRUPIGI ĈIUJN GESAMIDE--ANOJ EL NORMANDIO, INFORMADI PRI ESPERANTO EN NIA REGIONO KAJ APERIGI INFORMAN BULTENON :

" NORMANDA ESPERANTO BULTENO "

**1987 : ESPERANTO : 100 jara.**


**UNUIĜO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ : 40 jara.**

ESPERANTO FRANCUJO NORMANDIO

.LISTO ĜISDATIGITA LA 1AN DE JULIO 1987A.

| | | |
|---|---|---|
| ANGENAULT | GILBERT | (CAEN-GRUPO + FERVOJISTOJ) 23 ROUTE D'ASNELLES. 14114 VER SUR MER (31.22.22.86). |
| BETTENCOURT | GILBERT | (INFORMATIKA SLIPARO). LOTISSEMENT DE LA CHAPELLE. BOUVILLE. 76360 BARENTIN. (35.92.32.75). |
| CARON | SYLVIE | (SEKRETARIINO + LE HAVRE-GRUPO) 44 RUE GUSTAVE LENNIER. 76600 LE HAVRE (35.43.64.69). |
| DELAUNAY | RENÉ | (ESTRARANO) 114 BIS RUE DU RENARD. 76000 ROUEN. (35.70.16.70). |
| DOMINGO | CATHERINE | (ESTRARANINO) 132 RUE LOUIS PERGAUD. 76480 DUCLAIR. (35.37.41.21.). |
| DUBOURG | PASCAL | (JEFO-DELEGITO) 3 RUE GEORGES CHÉDANNE. 76150 MAROMME LA MAINE. (35.75.87.66). |
| GAILLARD | ANNIE | (ESTRARANINO) 4 RUE LOUIS JOUVET. 76800 SAINT ETIENNE DU ROUVRAY. (35.65.10.11). |
| GIBAUX | JEAN | (LE HAVRE-GRUPO). 28 RUE RAOUL DUFY. 76600 LE HAVRE. (35.42.18.66). |
| JOUVIN | PIERRE | (F.E.T.-RILATOJ). 14 RUE THIERS. 76120 GRAND QUEVILLY. (35.69.77.20). |
| LEGRET | ALPHONSE | (VIRE-GRUPO). 14 RUE DES SABLONNIÈRES. 14500 VIRE. |
| LEMARCHAND | PIERRE | (ROUEN-GRUPO + ELDONADO/SENDADO BULTENO). 43 RUE DESSEAUX 76100 ROUEN. (35.72.71.17.). |
| LHERMITTE | JACQUELINE | IMMEUBLE ANJOU. RUE GARIBALDI 76300 SOTTEVILLE / ROUEN. (35.73.51.77). (RILATOJ-FERVOJISTOJ) 5 RUE DE STRASBOURG 92600 ASNIERES (16.1.47.33.66.12). |
| MARTIN | CAMILLE | (LISIEUX-GRUPO) 14 RUE DU PRÉ D'AUGE. 14100 LISIEUX. (31.31.28.92). |
| MICHEL | PASCAL | (ESTRARANO) APPARTEMENT 1449. 79 RUE GRANDE. 27100 VAL DE REUIL. (32.59.38.62). |
| NICOLAS | YVES | (ESTRARANO : GEJUNULOJ) 17/37 QUARTIER DU BOIS 14200 HEROUVILLE SAINT CLAIR. (31.95.11.81). (CAEN-GRUPO + REDAKTAS+TAJPAS LA BULTENON). |
| POTTIER | PIERRE | (PREZIDANTO + YVETOT-GRUPO) 21 ALLÉE DES ROITELETS QUARTIER RÉFIGNY 76190 YVETOT. (35.95.14.69). |
| QUILLAUD | PIERRE | (VIC-PREZIDANTO / KASISTO + RILATOJ SAT-AMIKARO) 16 RUE DU LIEUTENANT DE VAISSEAU PARIS. 76120 GRAND QUEVILLY. (35.69.66.09). |
| ROBIOLLE | PIERRE | (DEPARTEMENTO MANCHE + FERVOJISTOJ) 18 IMPASSE JAMOT 50250 LA HAYE DU PUITS. (33.46.04.94) |
| ROUGET | CLAUDE | (BAYEUX-GRUPO + GEJUNULOJ) ECOLE LOUISE LAURENT RUE SAINT QUENTIN. 14400 BAYEUX (31.21.37.00). |
| TAILPIED | ALFRED | (TROUVILLE-GRUPO) "LA MARVENTO" HENNEQUEVILLE. 14360 TROUVILLE SUR MER. (31.88.50.33). |
| VERON | GASTON | (DOMFRONT-GRUPO) LA HAMARDIERE. 61700 DOMFRONT. (33.38.90.13). |

KELKAJ VORTOJ PRI LA ESPERANTO DOMO KASTELO GRÉSILLON



Esperanto-Domo. Kastelo Gresillon.

EN SEPTEMBRO 1951 ESTIS FONDITA, DE LA GRUPO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ, SUB LA INSTIGO DE HENRI MICARD, LA KOOPERATIVA ASOCIO "MAISON CULTURELLE DES ESPÉRANTISTES FRANÇAIS" (KULTURDOMO DE FRANCLANDAJ ESPERANTISTOJ). FINE DE LA JARO 1951, LA ASOCIO AĈETIS BIENON, KASTELO GRÉSILLON, APUD LA URBETO BAUGÉ, DEPARTEMENTO MAINE ET LOIRE, KIU MALFERMIS SIAJN PORDOJN AL LA ESPERANTISTOJ LA 14AN DE JULIO 1952. (DO JAM ANTAŬ 35 JAROJ !).

TIU BIENO ENTENAS 17 HEKTAROJN : PARKON, HERBEJON, LAGETON. ĈIRKAŬ LA KASTELO DUON-CIRKLE ETENDIĜAS KONSTRUAĴOJ, KIE TROVIĜAS LA GRANDA PRELEG-SALONO, LA KLASĈAMBROJ KAJ LA LABOREJOJ.

ĈIUJARE LA KULTURDOMO ORGANIZAS PRINTEMPAJN KAJ SOMERAJN STUD-PERIODOJN KUN PRELEGOJ, KURSOJ, EKSKURSOJ, DISTRAĴOJ.

<u>PETU INFORMOJN ĈE</u> : KULTURA ESPERANTO-DOMO,
KASTELO GRÉSILLON
49150 B A U G E

<u>KAJ LEGU ĜIAN GAZETON</u> : " KULTURAJ KAJEROJ " TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO.

<u>PETU PROVEKZEMPLERON ĈE</u> : PIERRE BABIN, 13 BOULEVARD DE LA CHAUVINIÈRE, 44300 NANTES.

<u>ABONO</u> : 65,00 F. POŜTĈEKKONTO NANTES N°2.813.61.L.

Iom pri nia regiona ligilo :

Vi havas en la manoj la 158an numeron. Ĝin redaktis kaj plej parte maŝintajpis Yves NICOLAS. Finpretigis, eldonis, sendis Pierre LEMARCHAND. Kun la helpo de Pierre QUILLAUD ni tute renovigis la sliparon. Jen la nuna stato de la senditaj bul--tenoj por tiu ĉi 158a numero :

| | | | |
|---|---|---|---|
| Departemento : | 76 SEINE MARITIME | : 85 | bultenoj |
| | 14 CALVADOS | : 40 | -"- |
| | 27 EURE | : 15 | -"- |
| | 50 MANCHE | : 3 | -"- |
| | 61 ORNE | : 6 | -"- |
| (1) | NORMANDIO | : 149 | bultenoj senditaj. |
| | Ekster Normandio | : 5 | -"- |
| | Ekster Francio | : 8 | -"- |
| | Asocioj Esperantistaj en Francio | 18 | -"- |
| | Asocioj neesperantistaj | : 3 | -"- |
| (2) | DIVERSAJ | : 34 | -"- |
| | SUME 1+2 | : 183 | bultenoj senditaj per la poŝto. |

**groupe espéranto région rouennaise**

**ESPERANTO RUENA REGIONO**

Por ricevi detalojn pri tiuj staĝoj, vi bonvolu skribi al nia asocia adreso : ROUEN ESPERANTO 43 rue DESSEAUX 76100 ROUEN.

Telefono : 35.72.71.17.

La aliĝilo aperos en la septembra numero de Normanda E° Bulteno.

**STAGES**


**17-18 OCTOBRE**
**14-15 NOVEMBRE 1987**
**12-13 DÉCEMBRE**
**9-10 JANVIER 1988**

Merkredon la 18an de NOVEMBRO 87a okazos en la Universitato de MONT SAINT AIGNAN (apud ROUEN) prelego de DETLEV BLANKE el D.D.R. pri : "Les langues planifiées ont elles une valeur scientifique" Vespere en ROUEN okazos alia prelego de la sama Profesoro : "Quelle langue internationale pour le monde moderne ?" Detaloj aperos en la venonta numero.

# COURS PAR CORRESPONDANCE DE LANGUE INTERNATIONALE ESPERANTO

## GROUPE ESPERANTO REGION ROUENNAISE

43 Rue DESSEAUX
76100 ROUEN
Tel : (35) 72.71.17.
c.c.p. : ROUEN. 2770.32.A.




Prix
- 200F
- 160F : ETUDIANTS, JEUNES, CHOMEURS
- 50F : CASSETTE (EN OPTION)

Contenu
- MANUEL DE COURS
- DICTIONNAIRE DE POCHE
- INFORMATION RÉGULIÈRE SUR LA LANGUE
- CORRECTION DES DEVOIRS
- ADHÉSION + SERVICE BULLETIN ASSOCIATION

imp. spéciale G.E.R.R.